*************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO majo 2006 (IC-9)
Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

=================================================================

I. GERMANIO: E-instruisto (juna, energiplena) urĝe bezonata
por gvidi E-kurson por gejunuloj (ĉ. 12-17 jaraj) en Freiburg iam somere dum ĉ. 3 tagoj enkadre de Ferien(s)pass. Bv. kontakti la organizanton: Konrad Gramelspacher haus25@gmx.net

II. BRITIO: Esperanto en bazlernejoj
Springboard – Lingvolanĉilo projekto: Vidu la belegan hejmpaĝon de la anglaj E-lingvoinstruistoj: http://www.springboard2languages.org
Ili opinias, ke oni povas bone vendi "nian eminentan varon", Esperanton kiel kapabloevoluigan lernobjekton.

Ĉu vi ŝatus aliĝi al la Internacia Laborgrupo, kies sola celo estas la disvastigo de la ideo kaj praktiko, ke Esperanto devus esti la unua fremda lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto en la bazaj lernejoj? Se jes, bv. sendi vian nomon, telefonnumeron, elektronikan kaj poŝtan adreson al zsofia.korody@esperanto.de

III. ITALIO: 39-a ILEI-Konferenco.
okazos en Parma. (25-29 julio 2006) kun la ĉeftemo: Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj. Estas diversnivelaj tranokteblecoj, la prezoj varias inter 21,00-75,00 EUR (en tendo aŭ ruldomo 6,00 EUR, en amasloĝejo 3,00 EUR kaj memzorgado).

Aliĝkotizo varias inter 15,00-70,00 EUR depende de la kategorio kaj loĝlando de la aliĝanto. Por mendoj post la 1-a de majo 2006 oni devas aldone pagi EUR 40,00. Post la 1-a de junio 2006 la organizantoj ne plu povos por vi mendi tranoktejon.
Informoj pri la konferenco kaj aliĝilo estas haveblaj en la hejmpaĝo de ILEI www.ilei.info aŭ en www.ukflorenco2006.it.

IV. La firmao "Filmoj Imagu" estas ĵus fondita kaj atendas la oficialigon en Brazilo.
Sekve de subteno de kelkaj esperantistoj "Filmoj Imagu" nun realigas filmon el la libro Gerda Malaperis de Claude Piron. Oni jam filmis 9 ĉapitrojn kaj la ceterajn oni filmos en majo kaj. laŭ la plano, ĉio (filmado, muntado, surdiskigado, pakado, ktp) devos esti preta ĝis la mezo de junio.

La oficiala paĝaro estas http://www.imagufilmo.org, kie oni trovas informojn pri la projekto, fotojn kaj povas antaŭaĉeti la DVD-on.
Antaŭmendoj de la filmo "Gerda malaperis" estas fareblaj pere de la konto ĉe UEA: arep-z. La prezo por antaŭaĉeto estas 16 eŭroj + ( sendokosto: 6 eurojn). Ankaŭ alia ĝenerala financa subteno estas realigebla tra tiu konto.

Kun multaj salutoj:
Zsofia Korody (GEA-komisiito por instruado)